Julio 2012 Esperanto-Societo Kebekia Jaro 27, No 108

# La Rivereŝo


Renkontu la ESF-estraron 2
MEKARO-2012 en Kebeko 3
Nova ondo da enmigrantoj (p.3) 9
Qui est le chef d'État du Canada ? 14
Kial paroli, se sufiĉas skribi ? 16
Revo de infanoj 19
Malkovru Liberlandon ! 20
La 1an de aprilo ĉe TEJO 21
Ŝanĝiĝoj en la ESF-estraro 23
Poezie 24




## MEKARO-2012 en Kebeko : En la « menuo » : esperanto, biero, turismo… kaj serĉado de perdita amikino !


*MEKARO-2012 à Québec : Au programme : l'espéranto, la bière, le tourisme… et la recherche d'une amie perdue !*













# Renkontu la ESF-estraron en Montrealo !

***Le conseil d'administration de l'ESF — la fondation qui finance lernu.net, edukado.net et d'autres initiatives pour l'espéranto — tiendra sa retraite annuelle à Montréal du 9 au 11 juillet. Venez les rencontrer le lundi 9 juillet, dès 18 h, au restaurant Le Commensal, rue St-Denis (salle de conférence, troisième étage).***

**La estraro de ESF (www.esperantic.org) okazigos sian ĉi-jaran kunsidon de la 9-a ĝis la 11-a de julio en Montrealo — venu al la restoracio Commensal (strato St-Denis, Latina Kvartalo — tria etaĝo) la 9-an de julio je la 18:00 por renkonti ilin!**


ESF ? Kio ĝi estas ? Eĉ se vi neniam aŭdis pri ESF, vi tutcerte konas ĝiajn projektojn : Lernu (www.lernu.net), Edukado (www.edukado.net), NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro, http://esperanto.org/nask), *Esperanto — Pasporto al la Tuta Mondo* (http://www.esperanto-usa.org/en/node/58), k.a.

Ĉeestos nuna ESF-prezidanto Mark Fettes, emerita ESF-prezidanto (kaj iama UEA-prezidanto) Humphrey Tonkin, plus la aliaj ESF-estraranoj — Derek Roff, Grant Goodall, Anna Bennett, Bonnie Fonseca-Greber, Wally Du Temple kaj Geoffrey Greatrex, ESF-konsilantarano kaj ESK-prezidanto Normando Fleury, kaj ESF-stabanoj/kunlaborantoj Joel Amis, Ĵenja Amis kaj Erinja Piateski.

Ni venu multnombre por bonvenigi la ESF-estraron al Kebekio !

**Kie :** Commensal St-Denis, tria etaĝo

**Kiam :** lundon, 9-an de julio je 18:00
















## MEKARO-2012 en Kebeko | MEKARO-2012 à Québec :

# En la « menuo » : Esperanto, biero, turismo… kaj serĉado de perdita amikino !

*Joel Amis*

***La ville de Québec a reçu en mai dernier la visite d'un groupe d'espérantistes, surtout canadiens, mais incluant aussi quatre visiteurs de l'étranger — deux Japonaises et deux Américains. Il s'agissait de la réunion régionale annuelle, appelée MEKARO, qui a lieu chaque année dans une ville différente du Québec ou de l'Ontario. Au programme : visite du vieux Québec, de la réserve huronne Wendake, des chutes Montmorency, et recherche d'Amandine ☺***

Kolektiĝis esperantistoj de Japanio, Usono, Francio kaj diversaj partoj de Kanado en Kebeko… Ĉu oni ŝanĝis la lokon kaj daton de la Universala Kongreso ? Aŭ eble de la IJK ? Fakte ne : temas pri nia « regiona » renkontiĝo MEKARO — kies renomo evidente nun etendiĝas ĝis la alia flanko de la Pacifiko ! Du esperantistoj — s-inoj ITABAŜI Micuko kaj ARAI Ĉitose — venis de Jokohamo, Japanio, por viziti nian belan kebekian ĉefurbon en varma (vere varma pro la nekutima 30-grada vetero en maja Kebeko !) Esperanta etoso kaj konatiĝi kun orienta kaj centra Kanado ĝenerale. Mi tamen devas iom hontigi miajn samlandanojn : la kvanto da japanaj vizitantoj *egalis* la kvanton da usonaj vizitantoj (kaj el tiu kalkulo mi ekskludas japanon kaj usonanojn loĝantajn en Kanado — unu el kiuj estas la aŭtoro) ! Ŝajne Usono situas iomete pli proksime al Kanado ol Japanio ! ☺ (Ne ofendiĝu, usonaj legantoj, mi simple volas instigi vin veni pli multnombre al ĉi tiu ĉarma turisma renkontiĝo ĉe la apuda najbaro !)

Ni komencis nian viziton enprofundiĝante en la historion de Kebeko sub la gvido de nia brava gvidanto Normando Fleury. Ekirinte de la Muzeo de Civilizacio, ni pluiris al la Reĝa Placo, kerno de la malnova urbo, kie ni vizitis muzeon pri la historio de la Reĝa Placo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo (ĝenerale la Malsupra Urbo de Kebeko). Tie ni spektis filmon (en la franca aŭ en la angla, laŭplaĉe) pri Samuel de Champlain, fondinto de Kebeko. Interalie, ni lernis



Kiel Particelli fariĝis Champlain

ke la plej famaj bildoj (pentraĵoj, statuoj, ktp.) de Champlain estas bazitaj ne sur lia vera aspekto, sed sur *tute alia persono* ! Fakte neniu plu scias kiel Champlain vere aspektis — la vizaĝo kutime prezentita kiel lia efektive apartenis al Michel Particelli d'Émery, konsilisto de kardinalo Richelieu. Poste ni disiris por esplori la muzeon. En la kelo, kiu datiĝas de la 17-a jarcento, ni trovis reproduktitajn loĝĉambrojn de la epoko kaj tiutempajn vestaĵojn — kiujn oni rajtas provi ! Mi ne povis rezisti la tenton vestiĝi kiel katolika pastro de la 17-a jarcento. Elektinte la plej grandan haveblan, mi baldaŭ konstatis, ke tiutempaj homoj ja pli malgrandis ol nun (necesis forte reteni la ventron por sukcese butonumi ĝin) !

Post plua esplorado de la Malsu-



Estas mi, Joel (la aŭtoro) — ĉu vi ne rekonis min?..

pra Urbo ni supreniris al la Supra Urbo per la funikularo, kiu grimpas la kabon, kiu apartigas la du urbopartojn. Ni promenis laŭ la promenejo, kiu superrigardas la Malsupran Urbon kaj la riveregon Sankta-Laŭrenco. Ni vizitis la monumenton al la generaloj Wolfe kaj Montcalm — sufiĉe nekutima monumento, ĉar ĝi samtempe honoras la du generalojn (britan kaj francan) de du malamikaj armeoj, kiuj ambaŭ mortis dum la sama batalo.

Ni finis la unuan tagon en la vegetara restoracio Commensal — sufiĉe tradicia kunvenloko por esperantistoj en Montrealo.

La sekvan tagon ni iom eliris el la centro de Kebeko al la indiana rezervejo Wendake, hejmo de la popolo hurona-wendat-a en Kebekio. Alveninte en ĉi tiu vilaĝo ni

tuj komprenis, ke ni troviĝas en nekutima parto de Kebekio. Ne pro la konstruaĵoj — la domoj tie aspektas kiel tiuj, kiujn oni trovas tra la kebekia kamparo. Temis pri la haltoŝildoj : en Kebekio sur haltoŝildo kutime aperas la vorto « Arrêt » (halto). Foje en lokoj kun multaj anglalingvanoj aperas « Arrêt » supre kaj « Stop » sube. Sed ĉi tie ni rimarkis, ke supre aperas la kutima « Arrêt », tamen sube aperas ne « Stop » sed « Seten » — la vorto por « haltu » (aŭ « halto ») en la hurona. Ni tamen lernis de nia gvidisto, ke tiu lingvo, bedaŭrinde, ne estas aktive parolata aŭ komprenata de la nuntempaj loĝantoj de Wendake, kvankam oni klopodas iom post iom revivigi ĝin (la tieaj huronoj asimiliĝis al la franca lingvo antaŭ generacioj).






En Wendake ni vizitis la iaman domon de la tribestroj de la popolo, muzeon kaj preĝejon. Je unua rigardo la preĝejo aspektas kiel tipa malnovstila katolika preĝejo : statuoj de Jesuo, la Sankta Virgulino, diversaj sanktuloj, ktp. Tamen je pli proksima rigardo ni rimarkis certajn subtilajn diferencojn. Jen ĉe la altaro videblas neĝoŝuoj ! Efektive, farado de neĝoŝuoj estas tradicia arto de ĉi tiu popolo — arto, kiu evoluis en modernan industrion, ĉar la huronoj de Wendake nuntempe produktas neĝoŝuojn el modernaj materialoj por vendi al diversaj sportvendejoj tra Nord-Ameriko kaj la mondo, kaj eĉ al la kanada armeo. Alia nekutimaĵo, kiu altiris nian atenton, estis statuo de indianino (en tre stereotipa stilo, verdire — fakte tiom stereotipa, ke iuj el ni ne povis rezisti kromnomi ŝin « Sankta Pokahontas »… nu, post kiam ni jam foriris de la preĝejo, evidente ! ☺) kun kandeloj antaŭ ŝi — same kiel oni atendus vidi ĉe statuo de la Virgulino aŭ aliaj sanktuloj. Nia gvidisto klarigis al ni, ke temas pri indiĝena katolikino de la 17-a jarcento, Kateri Tekakwitha, kiu estis beatigita de papo Johano Paŭlo la 2-a kaj kiu estos deklarita sanktulino fine de 2012. Kvankam ŝi ne es-

tis hurona (ŝi estis irokeza), ŝi estas tre grava por ĉiuj indiĝenaj katolikoj en Nord-Ameriko.

La antaŭtagmeza vizitado de la indiana vilaĝo sufiĉe stimulis nian apetiton — bonŝance la sekva halto en nia itinero estis bufeda tagmanĝo en Manoir Montmorency, apud la akvofalo Montmorency ! Tamen ni ne tute trankvilis : unu el ni — Amandine, franca staĝantino, kiu tiam loĝis ĉe Normando kaj Zdravka — ne sukcesis foriri kun la grupo matene. Malsimile al la plejparto de MEKAR-anoj, ŝi elektis loĝi en la centro de Kebeko, anstataŭ en la universitato Laval (malpli kostis kaj estis en pli interesa urboparto). Ŝi tamen ne sukcesis renkonti la grupon matene por iri al Wendake — do ni ne



sciis kio okazis al ŝi… Feliĉe, kiam ni alvenis al Manoir Montmorency, Amandine jam atendis nin tie — evidentiĝis, ke ŝi eniris la malĝust-direktan buson (sekvos plia ĉapitro pri Amandine poste en mia artikolo). Do, malsataj ni alvenis al abunda bufedo en Manoir Montmorency. Eble estas pro naskiĝo en la sudoriento de Usono (kie bufedoj oftas), mi ĉiam aprezas bonan, abundan bufedon (eĉ



se mia figuro ne tion aprezas ☺) ! Krom multe da varia, bongusta manĝaĵo, la dekoro estis eleganta — eĉ se tro homplena (kion klarigas la fakto, ke la bufedo okazas nur unufoje semajne).

Abunde farĉitaj, ni eliris (aŭ elruliĝis ☺) el la domego-restoracio por promeni al la akvofalo. La akvofalo Montmorency estas la plej alta en Kebekio, kaj 30 metrojn pli alta ol la akvofalaro Niagara (kvankam multe malpli larĝa, kompreneble). La malvarmeta nebuleto de la akvofalo agrable bonvenigis nin sub la nekutime varma maja suno. Kelkaj eĉ profitis de la okazo malsupreniri per longa ŝtuparo ĝis la malsupro de la akvofalo — duŝiĝante dum la malsupreniro. Tiuj, kiuj malsupreniris povis resupreniri aŭ piede per la sama ŝtuparo, aŭ per telfero. Interese (kaj pravige por tiuj, kiuj malŝatas tiajn veturilojn), la *sekvan tagon* tiu sama telfero paneis, lasante homojn pendi dum kelkaj horoj !

Post tre aktiva tago, ni revenis al Kebeko por vespera trinkado / manĝado (ĉar multaj el ni ne volis multe manĝi post la taga « paŝtiĝado » en Manoir Montmorency) en la trinkejo-restoracio Trois Brasseurs. Sed tie atendis suprizo por multaj el la ĉeestantoj : naskiĝtaga festo ! Evidentiĝis, ke Karlo (Carlos González Ávila, kun kiu vi konatiĝis en la antaŭlasta numero de *La Riverego*), konata al montrealaj esperantistoj kiel elstara vegana kuiristo, havis naskiĝtagon ĝuste en tiu



**« Naskita sub la protekto de Ŝia Reĝina Moŝto »**

tago (oni komentis, ke li estas sub la protekto de Ŝia Reĝina Moŝto Viktorino, ĉar lia naskiĝo preskaŭ perfekte koincidis kun « Viktorina Tago » ! ☺) ! Iuj « elfoj » eksciis tion antaŭe kaj surprize alportis kukojn por la okazo !

Bedaŭrinde, ke MEKARO daŭras nur semajnfinon, ĉar la fino venas tro rapide. La lasta okazaĵo de MEKARO estis vizito al la botanika ĝardeno de la universitato Laval. Kutime, por mi vizito al botanika ĝardeno ne estas la plej ekscita afero — ĉefe pro tio, ke mi ne scias multon pri plantoj (malgraŭ tio, ke mia patro scias ĉion pri plantoj).

Sed la profesia gvidado de Normando, profesia botanikisto, malkaŝas neatenditajn sekretojn de la ĝardenoj. Mi ĉiam lernas multajn novajn aferojn, kiam li gvidas en kiu ajn ĝardeno — eĉ la nomojn de la plantoj en tri aŭ kvar (Esperanto, franca, angla — eĉ latina) lingvoj… kies nomojn mi konis eĉ ne en la angla !



**Amandine en ĉapo de la 17a jarcento**

Post la vizito al la botanika ĝardeno venis la tempo manĝi kaj disiri. Ni devis kolektiĝi en la manĝejaro de apuda butikaro. Pro tio, ke ni grupe vizitis la botanikan ĝardenon, ni senprobleme trovis la lokon — malgraŭ tio, ke la manĝejaro estis iom kaŝita en angulo, kaj do ne tute evidenta. Sed, momenton — kie estas Amandine ? Neniu vidis ŝin matene… Ĉu ŝi denove prenis malĝustan buson ? La tempo pasis, kaj ni pli kaj pli maltrankviliĝis — ŝi ja devis veturi reen al Montrealo kun Normando kaj Zdravka. Pasis pli da tempo — ankoraŭ neniu signo de Amandine. Zdravka, kiu ĉiam patrinece zorgas pri ni ĉiuj, estis ekster si pro zorgoj — ŝi ja klare indikis la tempon kaj lokon… kion fari, se Amandine ne aperos ĝustatempe ? Ŝi havis nek telefonon, nek (kiel ni poste eksciis) monon ! Sed ni ja ne povis atendi la tutan tagon. Nu, eble ŝi revenis al la universitato — almenaŭ indas kontroli… Do, ni (mi, Ĵenja, Karlo González kaj Den Drown) reiris al la universitata loĝejo por kontroli, ĉu Amandine estas tie. Neniu ŝpuro de ŝi… Verŝajne ŝi devos petveturi reen al Montrealo… Bedaŭrinde… Ni do ekiras reen, ne povante ion fari. Tamen Ĵenja ekrigardas tra la aŭtofenestro al la apuda bushaltejo… ĉu povas esti ? Jes ! Estis Amandine ! Mirakle ni retrovis ŝin ! Evidente la ŝanco estas kun ŝi !

Ĉu mi sukcesis konvinki vin pri la bonecoj de MEKARO ? Se jes, vi denove havos okazon partopreni ĝin venontjare, kiam la ĉefurbo de Kanado, Otavo, gastigos la eventon. Mi vidos vin tie !

# Nova ondo da enmigrantoj : Esperantistaj ! (parto 3)

***Voici la troisième partie de notre série sur les nouveaux arrivants espérantophones. Cette fois c'est le tour de Martin Morris, originaire d'Angleterre, de prendre le relais.***

**Tio estas la tria parto el nia serio de artikoloj pri novaj membroj de la Esperanto-Societo Kebekia. Ĉi-foje estas la vico de Martin Morris, el Britio! Fakte, tiuj artikoloj fariĝis tiom popularaj, ke mi ŝatus fari daŭran rubrikon de *La Riverego,* kiu prezentos jen novajn, jen malnovajn, jen meznovajn membrojn de nia societo. Skribu, se *vi* ŝatus intervjuiĝi (riverego(ĉe)esperanto.qc.ca) — Red.**

Mi alvenis al Montrealo fine de aprilo 2011 kun mia edzo Daz kaj, kompreneble, mi rapide elserĉis la lokajn esperantistojn. Mi jam sciis, ke Kanado estas « lando de enmigrintoj », sed ne konstatis, kiom tio veras ankaŭ por la Montreala Esperanto-Klubo : fakte, mi sekvis du esperantlingvajn parojn, kiuj jam verkis pri si en la antaŭaj numeroj de *La Riverego*. Oni nomis tion « nova ondo da esperantaj enmigrintoj » — mi emas konsenti kaj certe tre ĝojas, ke mi estas parto de tiu nova ondo.

## Rakontu pri vi iomete !

Do, mi estas Martin, kaj mi estas la edzo de Daz. Altiris nin unu al la alia, inter aliaj aferoj, amo al lingvoj. Mi eklernis Esperanton en 1986 kaj aktivis sufiĉe multe en EAB, JEB kaj la Londona Esperanto -Klubo ĝis malfrue en la 90-aj jaroj, kiam aliaj postuloj de la vivo prenis de mi tro da tempo. Mi profesie ŝanĝis direktojn kelkfoje en la vivo : post la tempo kiel postdiploma studento pri kemio mi fariĝis teĥnologia fakulo ; mi daŭre faris tion ĝis 2006, kiam mi decidis ŝanĝi karieron por fari tion, kion mi ĉiam vere volis fari : esti bibliotekisto. En Britio mi faris magistran diplomon pri bibliotekaj studoj, kvalifikiĝis kiel bibliotekisto kaj laboris por la publikaj bibliotekoj de Hertfordshire, regiono norde de Londono, ĝis kiam ni decidis forlasi Bri-

tion por veni al Montrealo. Nun mi laboras kiel bibliotekisto ĉe la *McGill University Health Centre*, sed baldaŭ ŝanĝos postenon por eklabori por la Universitato McGill.

Amuzis min rimarki, ke el la (ĝis nun) kvin esperantistoj alvenintaj el anglalingvaj landoj neniu uzas la anglan kiel hejman lingvon. Daz kaj mi uzas la britan signolingvon (BSL), ĉar Daz estas surda. Tio signifas, ke lia lingva vivo en Montrealo estas eĉ pli bunta ol la mia. Dum mi uzas « nur » tri lingvojn ĉiutage (la anglan, la francan kaj BSL), Daz uzas kvin, ĉar en Kebekio ekzistas du signaj lingvoj : la *Langue des Signes québécoise* kaj *American Sign Language*. Ne surprize, do, ke poste ĉijare li komencos studi en UQÀM por magistriĝi pri lingvistiko.


Martin

## Kial vi elektis elmigri el via lando ? Kial vi elektis Kanadon ĝenerale kaj Montrealon specife ?

Mi absolute ne dubas, ke ĉiuj el la antaŭaj verkintoj spertas, same, kiel mi, ke oni regule devas respondi al la sama demando ! Niakaze, Daz kaj mi sciis ekde sufiĉe frue, ke ni iam dezirus loĝi en alia lando kaj sperti alian kulturon. Ni sciis, ke la mondo estas pli granda, ol Britio, sed ne povis findecidi, kien ni povus iri. Ni konsideris diversajn landojn en Eŭropo antaŭ ol komenci konsideri, ke, fakte, povus esti tre agrable kaj oportunplene vivi en Kanado ; ni ambaŭ tre admiras la liberalan vivstilon kaj (same kiel Karlo) konsideras Kanadon unu el la superaj landoj en la mondo. Sen deziri esti polemika, ni ambaŭ tre esperas, ke tion ne tro minacos la nuna registaro. Nin altiris ankaŭ la farema kulturo ; mi ĉiam sentis, ke en Britio oni tre malemas preni riskojn — tie ĉi oni bonvenigas personojn, kiuj preferas fari, ol senĉese tion pridiskuti.

Do, ni faris la unuan esplorvojaĝon en 2008 kaj, mi konfesas, ni ellasis Montrealon de inter la ebloj, ĉar mi estis absolute certa, ke mi ne sufiĉe bone parolas la francan. Tamen, post du tagoj en Toronto, ni decidis ŝanĝi niajn planojn kaj viziti Montrealon. Ni rapide enamiĝis — fakte ni anko-




raŭ certas, ke ni neniam antaŭe estis en tiom liberala kaj akceptema loko en niaj vivoj. Poste mi komencis kontakti kebekiajn bibliotekistojn por ekscii pri la laboreblecoj tie ĉi. Ĉiu absolute certis, ke mi ne havus malfacilaĵon trovi laboron kaj, do, ni decidis peti la vizon, kaj mi komencis multe labori por plibonigi mian francan !

### Ĉu vi konis Montrealon antaŭ ol vi decidis enmigri ?

Ni vidis Montrealon por la unua fojo en 2008 kaj, kiel jam dirite, tre rapide enamiĝis kun la urbo ! Ni poste revenis en 2010 por pasigi plenan semajnon, kaj eĉ pli enamiĝis.

### Ĉu Esperantaj aktivaĵoj estis decida aŭ influa faktoro en via decido elekti Kebekion kaj Montrealon ?

Fakte ne, sed mi certe kontrolis la E-an aktivecon en Montrealo kaj tre ĝojis vidi aktivan klubon kaj altkvalitajn regionajn renkontiĝojn. Certe, ne malinstigis nin la fakto, ke Montrealo havas tiom bonan klubon.

### Kiel diferencas E-aktivaĵoj en Montrealo de E-aktivaĵoj en via urbo / regiono ?

Londono estas granda urbo kaj, kiam mi esperantistiĝis, ĝia klubo estis sufiĉe granda. Estas malagrable konstati, ke la tiea klubo nun ŝrumpis kaj malpli viglas, ol antaŭ dudeko da jaroj. La montrealaj klubaj aranĝoj estas tre viglaj kaj neformalaj. Lastjare mi vizitis MEKARO-n kaj ARE-n, kaj enorme plaĉis al mi iliaj kultura diverseco kaj manko de seriozeco !

### Kiuj estis la unuaj Esperantistoj, kiujn vi ekkonis en Montrealo/Kebekio ?

Tio estas la unua Marteno en la klubo, Martin Benoit, kiun mi renkontis unue pere de Facebook kaj poste en 2010 dum nia vizito. Li donis al mi multajn sugestojn por helpi al ni sukcese instaliĝi — dankon, Marteno !

## Ĉu vi jam spertis la lokan vintron ?

Jes kaj ne ! La pasinta vintro estis tre milda, ĉu ne ? Oni promesis al mi temperaturojn de -40°C, ke miaj lipharoj tuj frostiĝos, ktp. — sed tio tute ne okazis. Nu, evidente, mi ŝercas ; la vintro estis tamen multe pli malvarma ol iam ajn en Eŭropo, kaj tio plaĉis al ni. Ni povis neĝŝuumi la unuan fojon, ekzemple.

## Kiel diferencas ĝenerale la vivo en Montrealo kaj en via urbo/regiono ?

Mi trovas la vivon tie ĉi pli liberala kaj senantaŭjuĝa, ol en Britio. Oni ne nur akceptas diversecon, oni festas tion. Mi rimarkis ankaŭ, ke la politika ekvilibro estas multe pli al la maldesktro. Estas tre malfacile imagi protestojn similajn al la nunaj studentaj protestoj en Britio, ekzemple, kaj eĉ pli malfacilas imagi, ke le registaro estus tiom preta eĉ konsideri negoci kun studentoj. Profesie, en Kanado mi konstatas, ke multe pli gravas tio, kion oni povas kontribui kaj fari, kaj *ne* kiu oni estas. Se oni estas preta labori kaj kontribui, oni povas tre rapide progresi.



**Dum unu el « neseriozaĵoj » (ARE 2011)**

## Kiom longe vi studis la francan antaŭ ol veni ? Ĉu estis sufiĉe facile alkutimiĝi al la kebekia franca ?

Mi studis la francan en la lernejo kaj poste legis ofte en la lingvo por ne forgesi ĝin. Mi ankaŭ aŭskultis la francan radion kaj komencis rigardi televidprogramojn ĉe TV5, kiam ni sciis, ke ni deziras veni al Montrealo. Mi havis privatajn lecionojn dum proksimume 18 monatoj antaŭ nia alveno, tio multege helpis al mi.

Tamen, mi ne vere konstatis la enorman diferencon inter la prononco de la franca en Francio kaj Kebekio ĝis kiam mi unuafoje vidis la konatan kebekian komedion *La Petite Vie*, de kio mi komprenis absolute nenion (eĉ foje kun la subtitoloj). Feliĉe, la enmigra intervjuo estis pli facile komprenebla ! Nun pasis iom pli ol jaro ekde nia

alveno en Kebekio, kaj mi nun trovas la kebekian francan multe malpli timiga, ol antaŭe. En mia nuna posteno mi parolas angle kaj france ĉiutage, tamen mi bezonas ankoraŭ multe da tempo antaŭ ol mi sentos min tute kompetenta kaj flua.

## Rakontu, se dum via restado ĉi tie okazis io interesa/amuza/nekutima !

Mallonge post nia alveno, kaj dum mi ankoraŭ studis por alkutimiĝi al la kebekia franca, mi decidis sendi mian unuan laborpeton, al la publikaj bibliotekoj de norda Montrealo. Post la unua intervjuo oni petis min veni « por respondi al kelkaj postintervjuaj demandoj ». Mi do alvenis al ilia oficejo je la 8 h 30 matene, rimarkis tie dekon da aliaj personoj, kaj komencis iom maltrankviliĝi, ĉar ili ĉiuj aspektis tre nervozaj… Ĉar mi estis preskaŭ malfrua, ne restis multe da tempo por interparoli, sed rapide evidentiĝis, ke temas fakte ne pri « kelkaj demandoj », sed pri trihora ekzameno pri biblioteka mastrumado, en la franca ! Mi sentis min absolute ne preta, sed tamen decidis, ke mi perdas nenion, se mi faros la ekzamenon.

Mi aŭdis nenion dum longa tempo, sed kvar monatojn poste oni informis min, ke mi estis sukcesa kaj ke mi povas nun havi duan intervjuon. Mi lernis multon pri postenplenigado post tiu sperto !

## QWERTY : Oni ne celis malrapidigon de tajpado!

**Komento rilate al *La Riverego* 107. En la artikolo « BÉPO », p. 16, oni legas :**

“Eble ne ĉiuj scias, ke la kutime nuntempe uzataj tajpoklavaroj estis aranĝitaj tute sen scienca pristudo. Fakte, la klavaro QWERTY (laŭ la nomo de la unuaj ses klavoj de la dua rango) kaj ĝiaj modifoj (kiel la franca AZERTY) havis kiel celon la **malplirapidigon** de la tajpado.” (Emfazo eĉ estis tiu de la aŭtoro, ne mia.)

Bedaŭrinde, mi simple devas malkonsenti. Estas kutima mito, kaj ofte ripetata malvero, ke la celo estis la malrapidigo de la tajpado. Fakte, la celo estis ĝuste la malo. La aranĝo estis zorge elpensita por preventi koliziojn de la literaj bastonetoj, kio efektive ebligis tajpi kiel eble plej rapide kun multe pli malgranda risko de meĥanikaj problemoj. Neniel oni havis enmense, ke la klavaranĝo malplirapidigu la tajpadon, kaj JEN la solvo ! — ne.

Gregorio Nacu

# Qui est le chef d'État du Canada ?

*Sylvain Auclair*

**Il y a quelques années (OK : il y a plusieurs années), alors que j'étais en voyage au Danemark parmi des espérantistes, on m'avait raconté qu'un voyageur avait trouvé les Danois si accueillants qu'il avait écrit à la reine du Danemark pour remercier le peuple danois dans son ensemble. Après tout, c'est bien à ça que servent les chefs d'État, surtout quand leur rôle est surtout symbolique et honorifique. On m'avait alors demandé à qui on pourrait bien écrire s'il s'agissait du Canada. Après quelques secondes de réflexion, j'avais répondu : *Al la vicreĝo.***

Avais-je raison ? Linguistiquement, s'entend. Comment traduire en espéranto *gouverneur général* ? Jusqu'à aujourd'hui, j'ai toujours dit *vicreĝo*. Selon Vikipedio, *vicreĝo estis posteno administri kaj guberni landon aŭ provincon, kiel reprezentanto kaj je la konto de reĝo aŭ imperiestro, kutime tre fore loĝanta.* Ça concorde tout à fait, bien que, de nos jours, le gouverneur général ne gouverne plus, pas plus que la reine, d'ailleurs. Cependant, l'usage linguistique et historique réserve plutôt le titre de vice-roi à l'empire espagnol et aux Indes, pas au Canada ou à l'Australie, par exemple.

Toujours selon Vikipedio — dont l'importance lui permet plus ou moins de fixer des normes lexicologiques — un *gouverneur général* serait un *guberniestro ĝenerala*. Rappelons qu'un *gubernio* est, selon PIV, *lando, landoparto aŭ kolonio, administrata de ŝtata oficisto*. Là aussi, le terme est marqué : il s'agit davantage d'une structure juridique de l'empire russe, même si le terme est clairement apparenté au mot français (et anglais) gouverner.

D'ailleurs, notre gouverneur général est plus qu'un fonctionnaire, qu'un *ŝtata oficisto* : il détient en fait des pouvoirs royaux, ou ce qui en reste. Il a son propre pavillon, par exemple, que j'ai reproduit pour illustrer cet article.



Standardo de la vicreĝo de Kanado




Standardo de la vicreĝo de Kebekio



Pierre Duchesne, vicreĝo de Kebekio, kaj lia edzino (kun Joel kaj Ĵenja Amis)

De plus, je n'aime pas trop l'adjectif *ĝenerala*. En fait, historiquement, les gouverneurs généraux ont d'abord été des militaires de haut rang. Après tout, il s'agissait d'administrer et de tenir un pays conquis, non ? Je préférerais donc parler de *guberniestro generala*. Ainsi, dans les provinces, on aurait des *leŭtenantajn guberniestrojn*. (Fait amusant, en Australie, on a un gouverneur général, mais les États ont des gouverneurs, sans l'apposition du mot *lieutenant*.)

Mais une langue internationale peut-elle vraiment avoir des titres distincts pour tous les systèmes politiques, titres qui calqueront le plus souvent les langues nationales ? Quel étranger pourrait comprendre alors les pouvoirs rattachés à chaque titre ? Pour ma part, je continuerai à dire *(provinca) vicreĝo*.

## Korespondpeto

Karaj samideanoj el Kanado, mi estas Nehemio Hans el Demokratia Respubliko Kongo, 28-jara, mi studas Esperanton lege-skribe, kaj ŝatus esti amiko de iu membro en via lando. Mi interesiĝas pri religiaj aferoj, kulturo kaj amikeco. Kun pacienco vian respondon mi atendas. Mia retadreso estas nehemiohans@yahoo.fr  Ĝis la reskribo!

## Interrete : Lingva demokratio

Vizitu la retejon :
http://www.ipernity.com/doc/32119/12863030/in/album/274503

Temas pri nova albumo konsistanta el (ĝis nun) 34 dokumentoj parte du aŭ tri-lingvaj (EO-FR-foje EN) laŭvole uzeblaj en diversaj cirkonstancoj (i.a. Rio+20) sub formo de virtuala ekspozicio, de afiŝetoj A4, de dokumentoj aldoneblaj al retpoŝtaĵoj, enretigeblaj ĉe Facebook, ktp.

[El la dissendolisto de Henri  Masson]

# Kial paroli, se suficâs skribi ?




*Silvano* La Lacerto *Auclair*

***Charles Bliss a inventé un langage idéographique, seulement écrit, qui a certaines ressemblances avec l'espéranto. Cette langue, quelque peu modifiée, est utilisée, sous le nom de Blisssymbolics, dans des hôpitaux nord-américains pour communiquer avec des personnes souffrant de handicaps les empêchant de parler.***

Oni rakontas, ke, dum la 30-aj jaroj, kemiisto Karl Blitz (konata kiel Charles Bliss, post kiam li ekloĝis en Aŭstralio) vojaĝis al Ĉinio kaj rimarkis, ke homoj tie parolantaj diversajn lingvojn tamen povas interkompreniĝi skribe, pro tio ke la ĉinaj karaktroj notas ne sonojn, kiel faras alfabetoj, sed signifojn (nu, pli-malpli). Ankaŭ influita de la Leibnica lingvologiko, li vidis en tio la solvon al la problemo de internacia kompreno kaj evoluigis sian *lingvon*, kiun li nomis *Semantography* (sencoskribo).

Tiu projekto spertis strangan destinon. Kompreneble, ĝi neniam establiĝis kiel internacia lingvo — ĝia neparolobleco tutcerte malebligis tion. Sed, ekde la 70-aj jaroj, ĝi estas uzata, en modifita formo — kio kaŭzis grandajn kverelojn kun s-ro Bliss — kaj sub la nomo *Blissymbolics*, por komunikigi infanojn kun cerba paralizo, aŭ, pli ĝenerale, ĉe homoj kun gravaj korpaj kaj komunikaj malhelpoj. Ili faras tion indikante, ofte per simpla rigardo, unu post la alia el 120 bazaj simboloj sur tabelo. Oni tamen parolas naturan lingvon al tiuj *blislingvanoj* — unuarange la anglan —, kio igis la blisan skribon pli-malpli alternativan skribon de la angla.



**Mi volas iri al kinejo**

## Kiel funkcias blisa skribo


Blisa skribo funkcias kun diversaj reprezentaj bildoj, derivitaj bildoj kaj tute arbitraj bildoj. Ekzemple, *buŝo* estas reprezentata per rondo ; *okulo* per rondo kun punkto en ĝi. La bildoj por ĉiuj sentaj vortoj (kiel *ami, dankon, konsciencriproĉo*) enhavas koron kun aliaj elementoj.


Kompreneble, oni povas krei malsimplajn bildojn el diversaj eroj,

kaj ankaŭ krei *kunmetitajn vortojn*, por tiel diri. Bildoj por *persono, viro* kaj *virino* estas similaj, kun tre kulture markita aldono de gamboj por viro kaj de jupo por virino* (fakte, temas pli pri la simboloj por ago kaj kreo : *viroj agas*, kaj *virinoj kreas-naskas*…). La sama simbolo por persono ankaŭ uziĝas, kun aldono de ciferoj 1, 2 kaj 3, por signi la pronomojn *mi, vi, li, ŝi*…

Iuj signoj estas ankaŭ uzataj kiel gramatikaj indikiloj, malpligrandigitaj kaj en supra pozicio. La simbolo por *ago* montras verbojn ; la simbolo por *skatolo* montras aĵon ; la simbolo por *multobligo* montras grupon (kiel la Esperanto sufikso -*aro*) kaj pluralon ; la simbolo por *priskribo/takso* signas adjektivojn.

S-ro Bliss foje solvis vortofarajn demandojn per sufiĉe simpla maniero. Por indiki *fingron*, oni simple aldonis al la simbolo *mano* montrilon (similan al >), kiu… montras la fingron. Same por *genuo* sur la simbolo de *gambo*, aŭ *talio* sur la simbolo de *korpo*. *Grundo* estas malsupra linio, *ĉielo*, supra linio, la *mondo* estas ambaŭ linioj, kaj la simbolo por *Bliss* estas tiu de mondo plus \, kiu signas *skribilon*…




Per *vortkunmetoj*, oni povas signi malsimplajn nociojn, kiel *familio, lingvo* aŭ *tradukisto*, kiel vi povas vidi ĉe la apudaj bildoj.

## Interesaj ideoj

Kvankam lia lingvo tute ne povas plenumi la celon unue metitan al ĝi, S-ro Bliss tamen havis tre bonajn ideojn, dum li analizis lingvajn konceptojn. Kiel en Esperanto, *arbaro* estas *granda aro da arboj,* sed *urbo* ankaŭ estas *granda aro da domoj. Patro* estas la *unue zorganta viro*, dum *frato* estas

la *due zorganta viro*. Mirsignon (!) oni uzas pli-malpli kiel la Esperantan sufikson *-eg-*. *Kuracisto* estas *medicinulo* (du simboloj), dum instruisto estas la *kon-donanta ulo* (tri simboloj). *Familio* estas *ŝirmejo de homoj* aŭ *ŝirmejo de paro* (mi vidis du simbolojn). *Sango* estas la *likvaĵo de vivo*, dum *haŭto* estas la *protekto de korpo*. Same kiel Esperanto, la blisa havas signojn por verboj kaj adjektivoj, havas signon por *mal-*, havas signojn por la tri bazaj verbotempoj, ktp.

Kaj same kiel la originala Esperanto, Blissymbolics preferas longajn aranĝojn de malmultaj simboloj al mallongaj aranĝoj de multaj vortoj ; sed en la blisa, tio estas tre grava, ĉar plej multaj blisuzantoj parolas per tabelo kun nur 165 simboloj — ĉiuj tabeloj estas farataj laŭ komunaj reguloj, sed ankaŭ kun iom da personaj trajtoj.

Kompreneble, la blisa tute ne estas kulture neŭtrala. Mi jam aludis la simbolojn por viro kaj virino ; mi nur aldone menciu la vorton por *Dio*, kiu rilatas kun la kreado, kaj la vorton por *religio*, kiu legiĝas kiel *sento* (koro) *pri Dio*… Kaj la fakto, ke ĉio ĉi estas pensata per la angla (ĝis la fakto, ke frazo kiel *he is reading a book* enhavas en la blisa la verbon *esti*…) igas ĝin eĉ malpli neŭtrala — kvankam ekzistas aliaj pli malpezaj gramatikaj aranĝoj.

** Tiuj fakte tute taŭge povus signi necesejojn…*

# Ĉu vi sciis ?..

**Lernu.net ĉi-jare festos sian 10-jariĝon. Jen kelkaj interesaj ciferoj pri ĝi :**

- Ĉ. 230 milionoj da vizititaj paĝoj ekde 2004
- ĉ. 120 mil registritaj uzantoj de Lernu loĝantaj en 218 landoj kaj teritorioj
- Usono estas la lando kun la plej granda nombro da vizitoj (pli ol miliono ekde 2005) kaj da registritaj uzantoj (pli ol 15 mil)
- Brazilo estas en la dua loko post Usono kaj laŭ la kvanto da vizitoj (ĉ. 800 mil ekde 2005) kaj registritaj uzantoj (pli ol 10 mil)
- Sur la tria, kvara kaj kvina loko laŭ la kvanto da vizitoj estas Francio, Germanio kaj Pollando, dum tiujn lokojn tenas Hungario, Ĉinio kaj Germanio laŭ la nombro da registritaj uzantoj.
- Ĉinio kaj Sud-Ameriko (pli signife, Kolombio) montras signojn de tre bona kresko (en kelkaj regionoj, pli ol 100% en la lastaj tri monatoj kompare kun la sama tempo pasintjare)

**Fariĝu ŝatanto de Lernu en Facebook :**

**http://www.facebook.com/lernu.net**

# Revo de infanoj

## *Ĵenja Amis*

**Mi konatiĝis kun François Hounsounou antaŭ ok jaroj dum TEJO-seminario en Francio. Li estis ege entuziasma pro sia unua eŭropa vojaĝo kaj li regalis nin per afrikaj bongustaĵoj. François estas daŭre entuziasma kaj aktiva esperantisto, kaj li ĵus sukcese ekzameniĝis por fariĝi lernejestro.**

Jam ekde kelkaj jaroj François aktivas kadre de neregistara Esperanta organizo Afrika Centro Moncivitana (ACM) kaj organizas internacian kampanjon *Revo de infanoj* por kolekti materialojn por lernejanoj, ĉefe, por helpi al orfoj, stratinfanoj kaj handikapuloj. Mi donacas al la kampanjo ĉiujare, kaj ŝatus peti ankaŭ vin sendi al ACM diversajn lernejajn necesaĵojn : ekz., kajerojn, krajonojn, skribilojn, not-papereton, librojn, revuojn (Esperante aŭ france) ktp. La disdono de la donacoj okazos ĉi-oktobre, sed poŝta sendado al Benino foje daŭras kelkajn monatojn. Mondonacoj per UEA ankaŭ eblas (**hufs-j**). Via nomo, kompreneble, aperos en la listo de donacintoj, kaj la infanoj el Benino estos ege dankemaj pro via donaco !







**Afrika Centro Mondcivitana/ACM**

**BP 226 Lokossa-Mono | Rép. du Benin**


**esperantoawc_benino@yahoo.fr aŭ acmbenin@gmail.com**
**www.bit.ly/revedenfants | www.ipernity.com/doc/42310/home/photos**



# Malkovru Liberlandon !

*Francisko Lorrain*

***Liberlando est un livre non linéaire, en fait un réseau de liens Internet amenant — en passant par diverses intersections, qui ont la forme d'agglomérations de lettres colorées — à des textes parfois en espéranto, parfois en anglais ou en polonais. L'auteur est un espérantiste polonais.***




Por eniri Liberlandon, iru al la retadreso liberatorium.republika.pl/liberlandia.html aŭ pli simple al ajna el la sekvaj:
www.liberlandia.com | www.liberlandia.eu | www.liberlandia.net| www.liberlandia.org
Vi tiam eniros la plaĉan liter-aran kaj tekstaran landon de Radosław Nowakowski. Klakante ie kaj tie, vi estos portata de loko al loko en tiu lando. Tiuj lokoj estas ofte simplaj vojkruciĝoj kondukantaj al aliaj lokoj, aŭ lokoj, en kiuj oni povas halti ioman tempon, legante tekston, foje Esperantan, foje anglan, foje polan. Nu, mi ne legas la polan, sed tio ne malhelpas ĝui tiun originalan paĝaron.

Jen kiel la aŭtoro mem priskribas Liberlandon :

*Jen mia ŝtato. Mia lando. Nek demokratio. Nek reĝlando. La reĝimo hiperteksta. La ŝtato senĉese kaj senfine konstruata. La libro komenciĝanta enmeze kaj disvastiĝanta, progresanta ĉiudirekten. La libera libro por liberaj legantoj. La lando kiun oni povas viziti elspezante preskaŭ nenion, pagante nur iom da tempo perdota por legado — nu, oni eble eĉ povus enspezi iomete, ja oni povus fari dum tiom da tempo ion pli nenepran, pli nenecesan kaj pli nebezonatan.*

Do fakte temas pri libro, sed pri tute alikoncepta libro : ties paĝoj ne sin sekvas laŭ simpla paĝnumera ordo, sed laŭ malsimpla reto de ligiloj, kun pluraj enirejoj.

Por pliaj informoj, legu Misgvidlibro*n* tra Liberlando.

# La 1an de aprilo ĉe TEJO

***Francisko Lorrain***

***Le numéro du 1er avril du bulletin de l'Association mondiale de la jeunesse espérantiste (TEJO) contenait des textes chinois ; seuls les titres étaient en espéranto. La raison annoncée était que, les espérantistes chinois se faisant de plus en plus nombreux, TEJO avait décidé, afin de les attirer, de publier désormais son bulletin dans leur langue ; les espérantistes ne connaissant pas le chinois n'auraient qu'à utiliser Google Traduction pour comprendre. Mais il s'agissait d'un poisson d'avril : en fait, ces textes chinois ne parlaient pas d'espéranto, mais du 1er avril lui-même !***




Lastan 1an de aprilo, la elektronika bulteno de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), *tejo aktuale*, numero 308, estis plejparte en la ĉina. Ĝi enhavis la sekvan noton, en Esperanto:

*Karaj legantoj, rekonante la enorman potencialon prezentitan de la pluregaj gejunuloj aktivantaj por Esperanto-movado en Ĉinujo, kaj dezirante plivastigi la abonantaron de tiu ĉi informilo, TEJO decidis ekde hodiaŭ eldoni T-A en la ĉina lingvo. Eluzante la plej multparolatan lingvon de la mondo por siaj informadaj celoj, TEJO tiel esperas atingi novajn pintojn en disvastigo de Esperanto, kaj plej grave, jam nun havi rekoneblan ĉeeston en la ĉina socio, alproksimiĝante unu plian paŝon al la tutmonda rekono de Esperanto kiel la sola vere internacia lingvo. Tiuj, kiuj maltrankviliĝas pro la ŝanĝo de la lingvo, ne zorgu — samkiel en ĉi-numero, ni lasos la titolojn en Esperanto, tiel ke la plej interesajn por vi erojn vi ĉiam povos traduki helpe de Google.*

Ekzemple, la unua ero estis la sekva:

**HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO, 27A DE APRILO ĜIS 1A DE MAJO, ALMAGRO, HISPANIO**

在欧美一些国家，陽曆4月1日是愚人节（幽默節），这一天，人们以多种方式开周围的人的玩笑，上当者当被告知是愚人节时，才恍然大悟，所以这一天总是能够引出许多笑话，不過某些玩笑也會因開得過大而引起人們的恐慌，或改變形勢衍生成為（網路）謠言與現代傳說。

Kiel raportite en la lasta numero de *La Riverego*, Google Traduction nun permesas traduki el kaj al Esperanto. Ni vidu kiel tiu tradukilo elturniĝas kun la supra teksto:

*Iuj landoj en Eŭropo kaj Ameriko, la gregoria kalendaro January 1st estas aprilo Fool Tago (humuro Festivalo), ĉi tagon, homoj en multaj manieroj por malfermi la ŝercoj de la homoj ĉirkaŭ la trompitaj sciigis ke la aprilo Fool Tago venis antaŭe, tial ĉi tiu tago la tuta povas konduki al multaj ŝercoj, sed iuj de la ŝercoj povas malfermi tro granda kaj kaŭzas homoj paniko, aŭ ŝanĝi la situacion derivita (reto) famoj kaj moderna legendo.*

Malperfektega traduko, sed tamen grandparte komprenebla ! En la aliaj eroj de la bulteno same temas pri la $1^{a}$ de aprilo. Interesiĝantoj alklaku la sekvan ligilon : tejo-aktuale nº 308.



# Ŝanĝiĝoj en la ESF-estraro — strategia evoluo progresas

**Kadre de planita transiro, Humphrey Tonkin emeritiĝis de la ESF-prezidanteco dum la aprila kunsido de la ESF-estraro. La estraro unuanime aprobis vic-prezidanton Mark Fettes kiel lian sukcedanton.**

Tonkin, 72, estis prezidanto de la Fondaĵo ekde ĝia fondiĝo en 1968. « La gvido de d-ro Tonkin estis esenca por la disvolviĝo de ESF », diris Fettes, profesoro de la universitato Simon Fraser en Kanado. « Mi tre kontentas, ke li restos en la estraro, kie ni povos daŭre profiti de lia sperto kaj saĝo .»

En lia fina prezidant-raporto al la estraro Tonkin rimarkis, ke ESF iras en « novajn direktojn » per « grandskala investado en klopodojn plividebligi Esperanton en la interreto ».

« Estas granda ŝanĝiĝo por ni, kvankam ĝi estas la kulmino de nia laboro dum la lasta jardeko, » konfirmis Fettes. « Ni transiras de ĉefemfazo pri esplorado kaj akademia studado al pli anticipa investado en la disvolviĝo de la interreta Esperanto-komunumo. Ni vidas ĉi tion kiel aliron, kiu, longperspektive, ebligos nin ampleksigi ankaŭ nian tradician esplor-rolon. »

Aliaj ŝanĝiĝoj en la estraro : Derek Roff elektiĝis vic-prezidanto, aliĝante al jama vic-prezidanto Grant Goodall. Anna Bennett kaj Bonnie Fonseca-Greber restas en la estraro kiel kasisto kaj sekretario respektive, kune kun estraranoj Geoffrey Greatrex kaj Wally Du Temple.

Timothy Reagan, iama ekzekutiva direktoro de ESF, forlasas la estraron pro lia baldaŭa transloĝiĝo al Kazaĥio, kie li servos kiel dekano de nova postdiploma lernejo pri edukado en la universitato Nazarbajev. Reagan tamen daŭre servos kiel membro de la ESF-konsilantaro.

[El Esperantic.org]

edukado.net

NASK

Esperanto Documentary Film Project

WikiTrans

lernu!

Tekstaro.com



**En tiu ĉi numero ni prezentos kelkajn poemojn de R. Joseph Capet, poeto, dramisto kaj eseisto loĝanta en Usono. Liaj verkoj (en la angla kaj en esperanto) eldoniĝis en diversaj revuoj, inkluzive de *decomP, ITCH, Taj Mahal Review* kaj *Sennaciulo*. Ni kore dankas lin pro liaj kontribuoj al *La Riverego* !**

# Aŭtuno II

## *R. Joseph Capet*

Folioj kuras pesilajn kursojn ;
dekstrumaj koriolisaĵoj
gutas tra la nebuleto—
fiksil'
de la ĉielalto.

Palacoj kvarcaj estas tie,
venusaj pordoj de tagsteloj,
festejoj lastaj de la suno,
plank' por ŝia senmoveta
kupro-braceletita danc'.

Jen la bildoj, Camus-indaj,
antaŭ kiuj sin malfermis
mia koro dum la tempoj
kiam pentris mi ankoraŭ.

Malsupre,
sub malsekaj branĉoj
de nudaj,
senpence
pozataj arboj,
estas la mond' akvarelo
sin ĝis la morto drinkanta.




# Memoroj

*R. Joseph Capet*

La trenfajfo tra la rikananta nokto
lulkantas la rapidantan teron,
lin diras ke li ne estas sola
en lia resalta volvo—
terura kurado el mortaj steloj.

Senflugaj insektoj grincas flugilojn
sub premanta mallumeco
kiel atlantidaj ĥoroj
la mismetitajn vortojn devus
kantinti : « Kaj la gloro de Dio
kovras la teron kiel akvoj kovras
la maron. »

Sed de vi mi nenion memoras—
nenion memorindan.
Povus esti voĉo,
aŭ vango,
aŭ luna kokaino sukerantas vian longan kolon...
Nenion mi memoras de vi.
Nur kiel vi igis min senti
ke mi povus senfine forkuri.



# La Malprismo

*R. Joseph Capet*

Volvrampaĵoj de la templo ame buklas en la grundo,
ĉerpas la malluman teron el la plej profunda fundo,
malrapide tinkturigas la marmorojn alabastrajn,
dum velkanta sun' briligas la altajn spirojn astrajn.

La lasto de krepusko konas bone la aferon—
la iridoj de la templo ame buklas en l' aeron
gutantaj je la spermo videbla nur en lumo nigra
briligata nur hazarde per lumportisto pigra.

Princ' de mallumeco... ba! Ho, obsidiana flamo—
malviditaj koloroj ĉiaj en sankta amalgamo!
Via nudec' kaj la palt' Jozefa estas unu kolor',
nigra kiel prahejmo nia aŭ la galaksia kor'.

Nenion rifuzante estas vi la nokta strando
kontraŭ kiu ĉiu ondo rompiĝas ĉe la rando.
Tuton akceptante estas vi la marprofundo
el kies opaleska nigro venas vivabundo.

Embarasita luno rapidege renoviĝas.
Eterne blankaj, la Plejadoj varmege enviiĝas.
La preĝejo sin oferas al la nokta mallumeco—
brakumas Lucifer' por koni la dian unuecon.

# Sajid Kutb

*R. Joseph Capet*

La globo krevas en ĉifonojn—
tapiŝpecojn fadenmontrajn
kiuj havas la odoron
de tabak' kaj de piec'.

Ne hazarde estas
ke menstrusango gustas
kiel ŝtalo,
ke flutoj el fragmitoj estas
de la bordoj de Eŭfrat',
ke kanonoj de konfetoj
sin mortigas kiel veŝtoj,
en milmil ŝnureretojn
de tro-streĉita bonintenc'.

Ne hazarde estas
ke oni ploras kiam
oni ne plu povas ridi.



# Esperanto-renkontiĝoj

| | |
|---|---|
| 5-11a de augusto 2012 : Internacia Junulara Kongreso | Hanojo, Vjetnamio |
| 6-8a de oktobro 2012: ARE | Silver Bay, NY |
| 18-20a de majo 2013 : 10a MEKARO | Otavo, Ontario |
| 17-19a de majo 2014 : 11a MEKARO | Sherbrooke, Kebekio |
| 16-18 de majo 2015: 12a MEKARO | Toronto, Ontario |
| 21-23 de majo 2016: 13a MEKARO | Granby, Kebekio |
| *provizore: 14 MEKARO (2017) : Kingstono (Ontario) ; 15a MEKARO (2018) : Montrealo (Kebekio)* | |

# Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

| | | |
|---|---|---|
| Lundo 9a de julio 2012 18 h Commensal | Renkontu ESF-estraron ! | |
| Vendredo 14a de septembro 2012 18 h* | Commensal | Jarkunveno de ESK |
| Vendredo 28a de septembro 2012 19 h 30 | MEDO | Japana vespermango (alportu ion !) |
| Vendredo 12a de oktobro 2012 18 h* | Commensal (sube) | |
| Vendredo 26a de oktobro 2012 19 h 30 | MEDO | |
| Vendredo 9a de novembro 2012 18 h* | Commensal (sube) | |
| Vendredo 30a de novembro 2012 19 h 30 | MEDO | |
| Sabato 15a de decembro 2012 18 h* | Commensal (supre) | 153-a datreveno de L.L. Zamenhof |

* Noto : manĝo je la 18-a , babilado ekde 19 h 30

Commensal St-Denis (restaurant végétarien — rue Saint-Denis) : 1720, rue St-Denis (entre Maisonneuve «Berri-UQAM»).
MEDO (Montreala Esperanto-Domo) • 6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8

# Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la autoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

**Redaktado kaj grafiko :** Yevgeniya Amis (riverego(ce) esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado :** Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain. **Estraranoj de ESK :** Normand Fleury (prezidanto), Ian Wheeler (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Suzanne Roy (konsilanto), Den Drown (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

**Rédaction et graphisme :** Yevgeniya Amis (riverego(à) esperanto.qc.ca). **Correction : Sylvain** Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de SQE :** Normand Fleury (président), Ian Wheeler (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Suzanne Roy (conseilère), Dan Drown (conseiller).

**Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2012.8.20**

**6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 | info @ esperanto . qc.ca • www.esperanto.qc.ca**

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

**Montreala Esperanto-Domo (MEDO)**

6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8

Vidu retejon por vidi kiel atingi

Voir site web pour un plan d'accès

Libroservo, biblioteko nepre kun antaua rendevuo

Librairie, bibliothèque sur rendez-vous seulement

## Pasporta Servo

Aligu tuj se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ce vi : www.pasportaservo.org. Vi povas ankau kontakti Jenja Amis (yevgeniya.amis(ce) gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.

